

2012-09-06 **Kemiaĵoj mortigas pli ol milionon da homoj jare**

La tutmonde rapide kreskanta uzo de kemiaĵoj estigas gravan minacon al la publika sano, diras la UN-a mediagentejo UNEP. Registaroj kaj industrio urĝe kunlaboru por malpliigi la riskojn.

La produktado de kemiaĵoj daŭre kreskas **tutmonde**. En Nord-Ameriko kaj Eŭropo la kresko estas taksata de 2012 ĝis 2020 je 25%. En Afriko kaj Mez-Oriento je 40% kaj en Azio eĉ je 50%.

"El la pli ol 140 000 kemiaĵoj, kiuj hodiaŭ estas sur la merkato, nur frakcio estas esplorita pri la sekvoj por homo kaj medio", asertas la agentejo en nova raporto. La uzado de kemiaĵoj en la industrio kaj terkultivado tial estas inter la kvin plej gravaj mortokaŭzoj, rezultigante pli ol miliono da mortoj jare kaj multoble pli da vundiĝoj kaj malsaniĝoj.

Laŭ la raporto en **Afriko sude de Saharo** la sankostoj pro malsanoj rilatantaj al la uzado de pesticidoj povas kreski ĝis 70 miliardoj da eŭroj. La taksata kosto pro veneniĝo per pesticidoj tiamaniere estas pli alta ol la entuta buĝeto por internacia helpo pri baza sanzorgo en la regiono, se oni ne enkalkulas la batalon kontraŭ HIV/Aideso, diras UNEP.

"Tutmonde, precipe en la evoluantaj landoj kaj estiĝantaj ekonomioj, la komunumoj pli kaj pli estas dependaj de kemiaĵoj, de sterkaĵoj (fekundenzoj) kaj naftoĥemiaĵoj ĝis plasto, por sia ekonomia evoluigo kaj plibonigitaj vivokondiĉoj", diras la direktoro de UNEP, Achim Steiner. "Sed la avantaĝoj de kemiaĵoj ne estu koste de la homa sano kaj de la medio. Malpuriĝo kaj malsaniĝo sekve de nepripensita uzado, produktado aŭ forigo de kemiaĵoj povas eĉ esti malhelpo en gravaj evoluigaj kampoj. Ili malpurigas la akvoprovizojn aŭ minacas la nutraĵan sekuron, boneston aŭ produktokapablon."

La **sekvoj ankaŭ sentebblas en la ekonomio**. "La tutmonda ekonomia perdo pro malbona mastrumado de vaporiĝemaj organikaj komponaĵoj ekzemple taksigas je 186 miliardoj da eŭroj laŭ la raporto. "Media damaĝo en **Ĉinujo** kostis al la ĉina komerca fiŝkaptado 500 milionojn da eŭroj. En **Usono** la neregulita uzado de pesticidoj estigis koston de 1,1 miliardoj da eŭroj pro detruitaj kreskaĵoj."

Registaroj kaj industrio urĝe kunlaboru por malpliigi la riskojn, avertas UNEP. Necesas leĝaj kadroj, pli bona internacia kunlaborado, konsciigo kaj evito.

(IPS/INM)

(dankon al Leo por la traduko de gazetara informo de agentejo Reuters)

Jen la originala dosiero de UNEP (2012-09-05) kiu enhavas multajn detalojn;

kun ligoj al por-gazetara teksto ankau en la oficialaj lingvoj de UN:

<http://unep.org/newscentre/Default.aspx?DocumentID=2694&ArticleID=9266&l=en>